

Johann Wolfgang von Goethe,  
Kanto de la spiritoj super la akvoj

*tradukita de Willy Nüesch*

La homanimo  
Similas al akvo:  
De l' ĉielo ĝi venas,  
Al ĉielo ĝi iras,  
Kaj infren ree  
Al tero ĝi devas,  
En ŝanĝo eterna.

Kiam de l' alta,  
Kruta rokmuro  
Fluas la pura radio,  
Ĝi polvas plaĉe  
En nubaj ondoj  
Al glata roko,  
Kaj mildakceptite  
Ĝi ondas vuale,  
Softmuĝe  
Al la profundo.

Kaj se rifoj  
Kontraŭas la falon,  
Ĝi ŝaŭmas indigne  
Ŝtup-post-ŝtupe  
Abismen.

...

En malprofunda fluejo  
Ĝi rampas tra l' valo herbeja,  
Kaj en la glata lago  
Paŝtas sian vizaĝon  
Astroj ĉielaj.

Vent' 'stas amanto  
Ĉarma de l' ondo,  
Vent' miksas funde  
Ondojn ŝaŭmantajn.

Vi, homa animo,  
Similas al akvo.  
Vi, sorto de l' homo,  
Similas al vent'.

*Traduko de la Germana poemo "Gesang der Geister über den Wassern" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-504-1025 (2013-08-28 18:48:20)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en la interreta poem-kolekto "Argiope.poezio.net".*